

tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

**PEPO SERĈAS
NOVAN TT-
REDAKTORON!**



**Nova TEJO-
komitato**

**Kasisto de
TEJO Prezentas
Sin**

**Esperantumado
en Georgiaj
Alpoj**



Sur Empire State Building en Novjorko

manoj. Kvankam mi kompreneble tre bedaŭras pri tio, ŝajne unu plia numero de TT mankos en 2006 pro la menciitaj kialoj.

Tio estas konvena enkonduko al iom malgaja anonco: mi baldaŭ ne plu redaktos TT-on. Ja ne temas pri malŝato de la laboro mem, nek pri iuj konfliktoj aŭ aliaj negativaĵoj. Simple, mi estas tro okupata por doni al TT la atenton kiun ĝi meritas. Mi nun laboras plentempe por la ŝtata registaro de Georgio, vicredaktas Kontakton, redaktas Esperanto USA-n kaj plenumas diversajn aliajn volontulajn rolojn (kaj Esperantajn kaj ne). Krome, la vicredaktorino, kiu lastatempe faris grandan parton de la redaktaj laboroj kaj serĉadis aldonajn materialojn, nun ankaŭ havas laboron (aldone al Kontakto, Esperanto USA kaj aliaj Esperantaj laboroj) do ne plu povas multe okupiĝi pri TT. Malfaciligas mian laboron ankaŭ la malmulteco de kontribuoj kaj ofta manko de subteno flanke de la TEJO-estraro. Ne temas specife pri la nuna aŭ la antaŭa estraro, sed ĝenerale – dum la periodo de mia redaktoreco nur unu aŭ du estraranoj aktive interesiĝis pri la bonfarto de TT kaj aktive kunlaboris tiucele. Kompreneble multaj kontribuoj devus veni ankaŭ de legantoj – sed se eĉ la estraro ne emas kontribui al la oficiala eldonaĵo de TEJO, mi apenaŭ povas atendi kontribuojn de la legantoj... Mi tre esperas ke la estraro, komitato kaj membraro ekhavas aktivan intereson pri la bonfarto de TT kaj laboros kiel teamo kun la nova redaktoro. Redaktoro povas fari bonan eldonaĵon nur se oni provizas lin/ŝin per bonaj

Post ioma paŭzo – ĉefe pro manko de kontribuoj sed ankaŭ pro la trookupateco de la redaktoro – TT denove estas en viaj

materialoj – kaj mi simple ne plu havas tempon serĉadi kaj petegi materialojn por kunmeti dece bonkvalitan revuon. Mi daŭrigos la redaktadon ĝis la fino de la jaro (maksimume), do ni nun aktive serĉas novan redaktoron. La kondiĉoj estas listitaj sur la dorskovrilo.

En rilata novaĵo, okazis alia demisio en TEJO – TEJO-prezidanto Heming Welde THORBJØRNSEN. Lia klariga letero legeblas sur paĝo kvin.

Sed sufiĉe da malgajaĵoj! Multaj el vi ĵus revenis de la IJK en Sarajevo – sed samtempe multaj (inkluzive min) ne povis partopreni. Ni do bezonas ke vi kiuj povis partopreni la IJK-on estu niaj okuloj kaj oreloj. La venonta numero de TT estos la kongresa numero, kaj viaj raportoj (ĉu pri la tuta kongreso, ĉu pri nur parto; ĉu intime personecaj, ĉu pli oficialecaj) estas urĝe bezonataj por ke ĝi estu sukcesa kaj donu kompletan, vivan bildon pri la kongreso al ĉiuj legantoj!

Agrablan legadon,

Joel

<Enhavo>

TEJO-Komitato 2006-2008	3-5
Demisio de la TEJO-prezidanto.....	5
Nova TEJO-kasisto Prezentas Sin	6-8
Esperantlingva Vikipedio Atingis 50 000	
Artikolojn!	9
Esperantumado en georgiaj... Alpoj ...	10-11
Mi vivis en Esperantujo	12-13
Grafikokonkurso de TEJO: june kaj kune.	14
Slava popolroko? Jes!.....	15
Nova Redaktoro por TEJO Tutmonde	
Serĉata!.....	16
Gratule	16

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel WORD-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: **TEJO Tutmonde, 16800 Phillips Rd., Alpharetta GA 30004, Usono.** Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Redaktoro: **Joel AMIS** (Usono). Vic-redaktorino kaj kompostistino: **Jenja AMIS** (Ukrainio/Usono). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

TEJO-Komitato 2006-2008

Komitatanoj A: (21)

Por Landaj Sekcioj: (19)

1. Argentino (ArgentEJO) – Cecilia PRUDKIN
2. Aŭstrio (AEJ) – Gregor HINKER
3. Brazilo (BEJO) – Rogerio BORGES GRILO
4. Ĉeĥio (ĈEJ) – Marek BLAHUŠ
5. Finnlando (FEJO) – Mira ANONEN
6. Flandrio (FLEJA) – Carsten MISCHKE
7. Germanio (GEJ) – Anna-Laura WICK-STROEM, Felix ZESCH
8. Israelo (JELI) – Sergio TYRIN
9. Italio (IEJ) – Daniela TAGLIAFICO
10. Hispanio (HEJS) – Manuel Alvara BERBIS
11. Katalunio (KEJ) – Joan CATALA
12. Litovio (LEJL) – Indre PILECKYTE
13. Nederlando (NEJ) – Nico HUURMAN
14. Norvegio (NJE) – Leif Arne STORSET
15. Slovakio (SKEJ) – Martin MINICH
16. Svedio (SEJU) – Magnus HENOCH
17. Ukrainio (ULEJ) – Katerina SEMJONOVA
18. Vjetnamio (VEJO) – Hai LY

Por Fakaj Sekcioj: (2)

1. E@I – Peter BALAŽ
2. EUROKKA – Rogener PAVINSKI

Komitatanoj B por la jaroj 2006-2008 (2)

1. Nicola RUGGIERO (Italio)
2. Ksenia PRILEPSKAYA (Rusio)

La komitatanoj respondis la jenajn demandojn:

1. Loĝloko;
2. Aĝo;
3. Profesio/studfako/vivokupo;
4. Ĉefaj aktivaĵoj/intereso en la Movado;
5. Ŝatokupoj;
6. Kion vi volas atingi dum via oficperiodo;
7. Vivdeziro.

Sergio TYRIN, Komitatano A por Israelo

1. Tel-Aviv, Israelo. Ekde oktobro: Beer-Sheva.
2. 22.
3. Programisto en la kampo de presitaj cirkvitoj.
4. Krom tradukado en- kaj el-, okupiĝas pri diversaj kampoj en la Movado, inter ili informado, pri zorgo de la israela reta E-centro, organiza agado, teno de kontaktoj kun ekster-movadaj profesiuloj. Estrarano de JELI ekde 2001 (en 2005 elektita prezidanto), ekde 2003 – estrarano de Esperanto-

Ligo en Israelo; vicredaktoro de la revuo *Israela Esperantisto* kaj mastrumanto de ties reta versio.

5. Interesiĝas pri multaj kromaj aferoj: lingvoj, nekonataj kulturoj, psikologio, lignoĉizado, aktorado. Estas enamiĝinta en Sankt-Peterburĝon (iama

Leningrado), badmintonon kaj bicikladon.

6. Elfosi vojojn por ke pli da gejunuloj partoprenu en internaciaj aranĝoj; plifaciligi al organizantoj de IJK la administran laboron; plifortigi la helpon de TEJO al LS-oj rilate aktivulan trejnadon.

7. Estas bela frazo: “ne prokrastu al morgaŭ tion, kion eblas fari postmorgaŭ”. Sed ne, ne skribu ĝin!.. Tio ne estas mia vivdeziro.



Ksenia PRILEPSKAYA, Komitatano B

1. Mi ĝenerale vojaĝemas kaj loĝas en diversaj lokoj po iom :-)

2. 25.

3. Ĵurnalismo, vojaĝoj, tradukoj por retaj E-projektoj, Interlingvistikaj Studoj en Poznan.

4. Retaj projektoj

5. Ĵurnalismo, vojaĝoj, tradukado de retaj E-projektoj, Interlingvistikaj Studoj en



Poznan.

6. Finfine ekscii ĉu eblas praktike enkonduki E-on en EU, kaj se jes, enkondukigi ĝin.

7. Moviĝo, evoluo!

Indre PILECKYTE, Komitatano A por Litovio

1. Kaunas, Litovio.

2. 18.

3. Sen statuso – mi ĵus finis la mezlernejon sed ankoraŭ ne eniris universitaton, tamen jam ekde aŭtuno mi devus studi tie, espereble en la psikologia fakoj (sed ankoraŭ ne scias ĉu mi sukcesos).

4. Mi ekesperantistiĝis relative antaŭnelonge (en la aŭtuno estos pasintaj jam du jaroj), do ankoraŭ ne



povas diri kio estos mia ĉefa intereso en ĝi, sed mi jam certas ke partoprenado en Esperantaj aranĝoj kaj renkontiĝoj vere estos unu el ili. Krom tio mi ankaŭ iom helpas pri la litova reta revuo pri Esperanto “mozaika”, kaj foje okupiĝas pri “kaptado” kaj

inspirado de pli novaj kaj pli freŝaj ol mi junaj litovaj esperantistoj.

5. Vojaĝoj, lernado (ia ajn – mi ŝategas ekscii novajn aferojn), babilado kun amikoj, legado ktp...
6. Unue pli bone konatiĝi kun TEJO kaj ĝia agado, samtempe provi revigligi la litovan junularan movadon (aŭ, se pli precize, rekrei iun litovan junularan organizon, kiu povus kunligi ĉiujn Egejunulojn ĉi tie) kaj provi levi ĝin al la internacia nivelo. Mi esperas ke tio ne estos ĉio kion mi faros dum la oficperiodo, kaj mi kapablos atingi ion pli).
7. Elvokoj kaj obstakloj de la vivo estas plej bonaj instruistoj – se ili mankas, oni devas serĉi ilin mem.

Mira ANONEN, Komitatano A por Finnlando

1. Helsinki, Finnlando.
2. 22.
3. Mi studas lingvistikon en la helsinka universitato.
4. Mi estas prezidantino de la universitata Esperantoklubo, EsperHe, en kies lingvokurso mi komencis lerni Esperanton antaŭ kelkaj jaroj. Krome mi kun geamikoj tradukas en Esperanton kantojn kiuj temas pri sciuroj. (Ne diskriminacianta elefantojn aŭ aliajn bestojn.)
5. Lingvokolektado, ridado, aventuretoj, tabulludoj, pentrado, fotado, trikado...
6. Ion.
7. Kresku, sed neniam malinfaniĝu!



Cecilia PRUDKIN, Komitatano A por Argentino

1. Neuquen urbo, Argentino
2. 24.
3. Fizik-instruistino – mi instruadas Fizikon kaj

Matematikon.

4. Membro de Neukena Esperanto-Rondo, Argentina E-o Ligo, ArgentEjo kaj UEA.
5. Literaturo, muziko, koni diversajn kulturojn kaj landojn, amikiĝi kun eksterlandanoj.
6. Plifortigi la Centran kaj Sud– Amerikan Movadon, vigligi la Movadon en Argentino, pliproksimigi Esperanton al lernejoj, universitatoj, kluboj, ktp.
7. Koni por ami.



Felix ZESCH, Komitatano A por Germanio

1. Grenoble, Francio
2. 22.
3. Studanto de ekonomiko kaj industria inĝenierio.
4. Esperanto kaj multlingvismo, Esperanto kaj ekonomiko.
5. Aikido, ŝako, linukso.
6. Mi volas daŭrigi la laboron de la pasinta oficperiodo por la antaŭenigo de malfermitaj formatoj kiel kutima uzataĵo por la komunikado en TEJO.
7. Por vivi nature bone necesas vivi en bona naturmedio.



Nicola RUGGIERO, Komitatano B

1. Mola di Bari, Italio
2. 20.
3. Nenifaranto/studento pri interlingvistiko.
4. Mi okupiĝas ekde mia movada naskiĝo pri redaktado, grafikajtoj, varbado kaj instruado de Esperanto.
5. Lingvistiko, muziko, literaturo.
6. Mi ŝatus atingi novajn riĉoplenajn spertojn por pluprogresigi TEJO-n.
7. Mi finu per plia metaforo: *ni estas kvar ranoj en marĉo, kvar ranoj kun nobla hobbio. Tiusence oni povus pli trafte kompari nin kun sciencfikciuloj, kiuj, same kiel ni, eldonas librojn kaj revuojn, kongresas kaj seminaras, korespondas, dediĉas sufiĉan atenton al trupo da diversnaciaj verkistoj*



kaj, fine, opinias sian okupon la plej grava en la mondo, amen. Amen.

Jorge Camacho

Derk EDERVEEN, Kompilanto de Pasporta Servo

1. Voorburg, ĉe Den Haag, Nederlando.
2. 41.
3. Mi studis informadikon kun multaj aldonaj lingvaj fakoj, laboris kiel programisto kaj esploristo pri parolrekono, kaj nun laboras kiel 'lingvulo' en kompanio kiu produktas administran programaron kie mi okupiĝas pri manlibroj, helptekstoj, tekstoj en la programo, la retejoj, leteroj, ktp. ktp.
4. Depost 1995 mi kun granda plezuro por TEJO administras kaj kompilas Pasportan Servon (<http://www.tejo.org/ps>), ĉiujare la plej vendata kaj arde atendata Esperanto-libro. Dum 1983-1996 mi aktivis en Nederlanda Esperanto-Junularo kiel kasis-to kaj membro-administranto, kunorganizis IJK-on 1989 en Kerkrade, gvidis kelkajn E-kursojn en Nijmegen kaj Den Haag, tradukis *Pieter Bas*, tre leginda libro de konata nederlanda verkisto Godfried BOMANS ([http://katalogo.uea.org/katalogo.php?](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=4150)

[inf=2995](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2995)), kaj por nederlanda kompanio BSO (kun teamo de tradukantoj) la libron *Infoduktoj* de Luc de Brabandere (<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2995>). Ĉe BSO mi cetere faris mian finstudan projekton kadre de la projekto *Distribuita Lingvo Tradukado*, kiu uzis Esperanton kiel pontlingvon en duonaŭtomata tradukado.

5. Viziti teatron kaj bonajn restoraciojn, vojaĝi, motorcikli, aŭskulti muzikon.

6. Dum la venontaj jaroj mi volas atingi:

- ke Pasporta Servo atingos novan rekordan nombron da gastigantoj kaj/aŭ landoj
- ke la procentaĵo da gastigantoj ekster Eŭropo kreskos
- ke la hejmpaĝo de PS integriĝos en tiun de TEJO
- ke fariĝos pli facile donaci monon por subteni Pasportan Servon
- ke eblos distribui Pasportan Servon en elektronika formato al gastigantoj por ŝpari preskostojn kaj afrankojn.



Demisio de la TEJO-prezidanto

Karaj Gekolegoj,

Kun peza koro mi skribas tiun ĉi leteron, kiun mi dum longa tempo jam esperis ke ne estos necesa. Sed post longa pripensado kaj repensado mi venis al la konkludo ke mi devas rezigni mian postenon de prezidanto de TEJO, kaj mi avertis pri tio jam al la Ĝenerala Direktoro Osmo BULLER kaj la Estraro.

Mia decido baziĝas sur tio ke mi vidas ke mi ne kapablas plenumi miajn taskojn en kontentiga maniero. Tio ĉi ne estas bona situacio por TEJO, kaj estus pli bona solvo trovi alian prezidanton kiu kapablas plenumi siajn taskojn laŭ la bezonoj kaj postuloj de la organizo kaj ties Komitato kaj Estraro. Mi agnoskas ke tio ĉi ne estas tempo dum kiu TEJO bezonus demision, sed ja neniu tempo estas konvena tempo por tio, kaj mia decido bedaŭrinde estas fina.

Mi substrekas ke mia demisio ne rilatas al la interna funkciado de TEJO aŭ la rilatoj inter TEJO kaj UEA. Mi spertis dum la lasta jaro bonan kunlaboron, kaj ne kritikis ajnan personon.

Mi denove bedaŭras la situacion, kaj por pliglatigi la aferon mi daŭrigos mian prezidantan laboron ĝis IJK 2006 inkluzive, tiel ke mia posteulo povos dum la tiea komitatkunsido esti elektita. Konsekvence mi efektive demisios la 13-an de aŭgusto 2006.

Nun estas la respondeco de la Estraro kunlabore kun la elekta komisiono trovi mian posteulon, kaj la Estraro rajtas min anstataŭigi jam nun se ili tion preferas. Se neniu alia kandidato estos trovita je mia efektiva demisio la unua vicprezidanto plenumu la postenon ĝis kiam kandidato estos trovita. Sed kiel menciite mi volonte daŭrigos ĝis inkluzive la komitatkunsidojn en Sarajevo.

Mi dankas vin ĉiuj pro la bona kunlaboro kaj petas vian pardonon pro la malavantaĝoj kiujn mi nun al vi donas.

Plej amike,
Heming WELDE THORBJØRNSEN

(Letero sendita al la TEJO-komitato)

Nova TEJO-kasisto Prezentas Sin

Kial Esperanto?

Mi nomiĝas Adélaïde CHARRIÈRE en la franca lingvo, sed mia Esperanta nomo estas Adenjo. Mi loĝas en Douvaine (Francio) du jarojn.

Mi instruas matematikon kaj informadikon de antaŭ 3 jaroj. Nuntempe mi emas orienti alimaniere mian profesion kaj ne konas la estontecon en septembro 2006, krom ke mi komencos diplomon pri infanaj rajtoj.



Mi esperantistiĝis en 1989, per poŝta korespondado. Poste mi partoprenis unu Internacian Infanan Kongreseton (IJK) kaj kelkajn UK-ojn, ĝis 1998 kiam mi malkovris la ekziston de IJK. Mia plej granda plezuro kun Esperanto dum la lastaj jaroj estis ĝuste vojaĝi trajne dum unu monato somere tra tuta Eŭropo. Tio estis por mi bela okazo ĉeesti Esperanto-aranĝojn kaj viziti miajn geamikojn el diversaj landoj.

Mi tre ŝatas vojaĝi per trajno. Ĝi estas unu el la plej ekologiaj vojaĝ-manieroj. Tiel mi havas neniujn zorgojn (iu ŝoforas por mi), povas halti kiam ajn mi volas... kaj eĉ ekkoni novajn geamikojn. Tiel mi invitis lastsomere nederlandanon al la Esperanto-domo en Oslo!

Ĉi-somere 2006, mi denove uzos la karton *Interrail* por senpagaj trajnoj dum unu monato, por ĉeesti la UK-on en Firenze kaj la IJK-on en Sarajevo. Ankaŭ vi iru tien!

Ŝatokupoj

Krom vojaĝi (tio jam okupas grandan parton de mia tempo), mi ankaŭ tre ŝatas **sportumi**. Depende de la vetero kaj sezono, mi biciklas, grimpas, piedmigradas, naĝas... Vintre mi tre

ŝatas neĝtabuli, sed ankaŭ foje elektas alian formon de "neĝumado". Mi havas grandan bonŝancon loĝi apud lago (Lemana Lago) kaj montaroj (la Alpoj).

Mi provas kapti ĉiujn eblojn **renkonti miajn familianojn**. Mia familio estas tre granda (ni estas 21 gekuzoj) kaj ni ofte renkontas unu la aliajn.

Ĉiujn kvar jarojn, ni organizas "Olympiades de la Famille Delachenal". Ĝi estas grandaj olimpikaj ludoj (someraj) por la familianoj (ĉirkaŭ 200 personoj dum unu semajno). Ni ludas tablotenison, piedpilkon, retpilkon. Piedpromeni, grimpi, supren-bicikli... Okazas muzika vespero, teatra vespero, danca vespero. Ĝi estas okazo paroli kun familianoj de ĉiuj aĝoj (de kelkaj monatoj ĝis 90 jaroj) kaj de pluraj regionoj de Francio, Kanado, Usono...

La lastan vesperon, la venkintoj ricevas premion (po aĝkategorio, sekso, sporta disciplino...). La venontaj Olimpikoj okazos en 2008.

Se vi ŝatas sportumi kaj havas grandan familion (aŭ multe da geamikoj), mi vere instigas vin organizi tian eventon. Ĝi donos al vi neforgeseblajn memoraĵojn.

La Esperanto-movado kaj mi

Ĉefaj aktivajtoj

Mi komencis aktivi en la Esperanto-movado en januaro 2002. Tiam mi **kunordigis** regionan agadon por JEFO. Tio signifas ke mia tasko estis teni kontakton inter ĉiuj esperantistoj de la Rodanalpa regiono (pli granda ol Belgio). Mi tiom ŝatis tian laboron ke mi poste iĝis kunordigantino de la regionaj ge-kunordigantoj por la tuta Francio. En januaro 2004, mi organizis labor-kunvenon por ĉiuj kunordigantoj. Estis sufiĉe interese, simple dividi spertojn kun aliaj samtaskanoj.

Krome, mi ankaŭ **organizis** plurajn "distrajn" semajnfinojn (montaran, ludan, ĵongladan...). Mi tiam ekkonsciis kion necesas fari por organizi aranĝojn (planita buĝeto, subvencipeto, aliĝilo,

rezervo de loko...). Mi konsilas al ĉiuj aktivuloj iam organizi tian aranĝon. Tio donas al vi nekredoblan memfidon rilate al kapablo plani ion, kaj ĝi helpas vin ne nur en Esperanto-aktivado sed ankaŭ en via ĉiutaga vivo!

Komitato membrigi ankaŭ plaĉas al mi. Mi engaĝiĝis dum du jaroj ene de la JEFO-komitato, kie mi spertis laboron asocian kun gejunuloj el tuta Francio. Mi membris ankaŭ en la komitato de JES (Junularo Esperanta Svislanda) kaj provis ligi la regionon Rodanalpan al unu el plej proksima lando.

Antaŭ ol engaĝi min ene de TEJO, mi spertis bonegan kunlaboradon ene de la Rodanalpa Federacio. Dum pli ol du jaroj mi estis membro de la komitato, kaj helpis organizi festivalon. Mi ŝatus danki Jean-Louis GAYET kaj Michel FONTAINE kiuj instigis min agadi por la federacio. Tie mi havis bonegan sperton de **inter-generacia kunlaborado** kaj ĝi tre plaĉis al mi; mi esperas ke mi povos denove travivi tion.

Instruado ĉiam interesis min. Mi ja estas profesie instruistino de sciencoj, tial plaĉas al mi instrui lingvojn (tute alia speco de instruado). En la UK en Berlino (1999), mi komencis **Cseh-seminarion**... kiun mi finfaris en la UK en Vilno (2005). Tuj poste mi feliĉe povis instrui Esperanton al komencantoj dum la IJK en Zakopane (2005). Estis bonega sperto. Poste, mi denove instruis Esperanton dum la IS en Xanten (2005 – 2006).

Krom tio, mi partoprenis la seminarion de “Flugiloj de Malfacila Vento” kiam ĝi unufoje okazis (IJK Kovrov, 2004). Mi vere tre konsilas sekvi ĝin (kaj tre dankas al ILEI ke ili ek-okazigis ĝin), por ricevi instigon organizi kurson de Esperanto en via lando.

Mi ankaŭ tre ŝatus instrui Esperanton per ludoj, same kiel ĉiuj lernis sian gepatran lingvon.

Interesoj en la Movado

Multaj flankoj de la Movado interesas min, tial mi decidis engaĝiĝi ene de TEJO. Jen kelkaj ideoj kiujn mi havas:

- instrui al infanoj per ludoj
- organizi (iam?) aranĝojn por adoleskuloj (13-18

jaroj): mi mem partoprenis infanan kongreseton kaj tre ŝatis ĝin. Mi ŝatus doni pli facilan aliron al Esperanto por gejunuloj.

- re-eldoni Esperantajn ludojn, eble iam eldoni “skrablon”.

Mi ŝatus ankaŭ pli malfermi Esperanto-aranĝojn al ekstera publiko. Doni eblecon al ne-esperantistoj ekkoni nian Movadon de ene, ne nur de ĵurnalista vidpunkto, sed de propra sperto.

Sed tiuj estas ja nur ideoj, kiujn mi eble neniam konkretigos.

Kion vi volas atingi (dum oficperiodo)?

Mi ĵus eniris la TEJO-teamon kun kelkaj emoj kaj sugestoj:

– **Ligi** pli forte TEJO-n kaj ĝiajn LS-ojn. En multaj landaj sekcioj (LS) aktivis gejunuloj... kiuj verŝajne neniam engaĝiĝos en TEJO. Mi ŝatus instigi tiujn gejunulojn partopreni la decidojn de TEJO kaj aldoni siajn naciajn spertojn.

– **Organizi** kunvenon de kasistoj de LS-oj kaj pli bone ligi ilin. Peni pli multe labori kune. Kasisto ja estas grava posteno en asocio, tial gravas ankaŭ ligi tiujn homojn kune, por ke ili sentu sin pli fortaj kaj pli efike kunlaboru.

– **Helpi** je plibonigo de la administra sistemo de TEJO (kasistado, membroj...).

– **Instigi** pli da gejunuloj inter 20 kaj 30 jaroj partopreni UK-ojn. UK estas alia speco de Esperanto-aranĝo. Mi tre ŝatas ĝian seriozecon, tiun okazon renkonti pli spertajn esperantistojn. Junulo kiu volas dum sia tuta vivo partopreni Esperanto-aranĝo iam verŝajne partoprenos UK-on. Ĝi ankaŭ estas okazo por UEA plifortigi sian laboron kun gejunuloj.

– **Plifortigi** la rilatojn inter UEA kaj TEJO.

– Instigi pli da virinoj aktivi en la Esperanto-movado.

Kaj persone

Mi esperas iam finfine partopreni TEJO-seminarion kiu ŝajnas al mi tiom alloga.

Lingvoj kaj espero

Kion mi sentas pri lingvoj ĝenerale? Esperanto estas por mi kiel gepatra lingvo (mi ja lernis ĝin kiel unuan fremdan lingvon kiam mi havis naŭ jarojn) kaj nun mia “ama” lingvo. Mia koramiko



estas belgo kaj ni kune ĉefe per Esperanto interkomunikas. Tial mi uzas Esperanton ĉiutage (foje eĉ venas al mia kapo unue Esperantaj vortoj, ne la francaj esprimoj).

Tamen mi tre ŝatas lerni fremdajn lingvojn kaj nun lernas memstare la nederlandan. Tiel mi jam lernis la danan lingvon antaŭ kvin jaroj. Krome, mi ankaŭ parolas la francan, la germanan (mi studis unu jaron en Heidelberg) kaj la anglan lingvon.

La franca filmo “L’auberge espagnole” plej bone priskribas min, eŭropanino kiu tre ŝatas vojaĝi, ekkoni novajn personojn, malkovri novajn landojn... kaj paroli plurajn lingvojn.

Vivdevizo

Kiel klare resumi en kelkaj frazoj tutan viv-filozofion?

Unue, mi dirus ke gravas fari aferojn kun plezuro kaj deziro.

Respektu ĉiujn (kaj ĉion).

Mi provas ĉiam vidi la pozitivan flankon de okazajoj.

Gravas substreki bonecon de homoj, tiel la aliaj “vidos” nin kun pozitiva maniero.

Kaj laste: antaŭ ol ili iĝu tro grandaj revoj, tuj realigu viajn dezirojn. Faru tion kio plej plaĉas al vi.

Nia estonteco

Kial infanoj tre gravas?

Infanoj kaj gejunuloj tre plaĉas al mi. Unue ĉar ili estas la **estonteco** de nia mondo, kaj trakti ilin bone signifas poste havi bonajn plenkreskulojn en nia socio. Due ĉar ili timas nenion kaj plej ofte diras rekte kion ili pensas. Ili estas honestaj kaj naivaj. Ili ankoraŭ ne perdis la kapablon realigi siajn revojn. Ili havas multajn ideojn por ŝanĝi la mondon.

Pro tiuj kialoj mi tre ŝatas ludi kun infanoj kaj gejunuloj. Mi laboras kun adoleskuloj inter 12–kaj 14-jaraĝaj kaj tio multe plezurigas min. Doni al ili **memfidon**, pozitivecon kaj respekton al la aliaj ŝajnas al mi granda tasko por ni pli-aĝuloj.

Tro ofte homoj ne volas aŭskulti opiniojn de junaj personoj, nek aĝi agrable al ili. Por pli bone koni tiun temon, mi decidis studi infanajn rajtojn kaj venontjare akiros “Diplôme en protection des droits de l’enfant”.

Konsiloj al ne-membroj de TEJO-komitato — aŭ kial engaĝi sin por TEJO?

Mi ŝatus rakonti al vi kia estis mia unua estrarkunsido. Mi alvenis matene en la CO en Roterdamo kaj jam aŭdis (dum matenmanĝo) plurajn lingvojn (la norvegan, la rusan, la germanan, la usonan...). Divenu kiuj homoj estis tie? Esperantistoj! Estis kiel etoso de IJK aŭ UK, sed por labori kune. Mi ege aprezis tiun ĉi kunsidon. Ni sufiĉe rapide antaŭeniris, mi eĉ povis doni mian opinion (mi ege miris pro tio, ĉar mi ĵus eniris la estraron, sed pro miaj spertoj en JEFO kaj la rodanalpa Federacio, mi jam povis kompreni kelkajn gravajn traktendajn punktojn).

Sperti kia estas internacia kunlaboro,

Senti kiom bona estas tiom rapide kompreni sin per pont-lingvo.

Senti emon ankaŭ mem organizi iun gravan aranĝon, aŭ

simple partopreni seminarion...

tio jes eblas kun TEJO!

Esperantlingva Vikipedio Atingis 50 000 Artikolojn!

La 7-an de julio 2006, en la Esperantlingva Vikipedio estis verkita la 50 000-a* artikolo. La Vikipedio estas multlingva libera interreta enciklopedio, verkita kunlabore de volontuloj.

Vikipedio aperis en 2001, unue kiel nur anglalingva versio, sed ĝi rapide fariĝis plurlingva. La Esperanto-versio aldoniĝis en 2002 kaj komenciĝis dank al la materialo kolektita de Stefano KALB por la unua reta Esperantlingva enciklopedio "La Enciklopedio Kalblanda". Ekde tiam la Internacia Lingvo daŭre okupas bonan pozicion inter la plej vaste uzataj lingvoj de la mondo. La anglalingva vikipedio atingis unu milionon da artikoloj jam en marto 2006. La germana, franca, pola, japana kaj nederlanda vikipedioj preterpasis ducent mil. Sekvas la sveda, itala, portugala kaj hispana kun pli ol cent mil. Atinginte kvindek mil artikolojn Esperanto eniras la klubon kun la ĉina, la rusa la norvega kaj la finna. Sekvas 12 lingvoj kun pli ol dudek mil, 12 aliaj kun pli ol dek mil. Entute la Vikipedio ekzistas jam en preskaŭ cent lingvoj, inter kiuj kelkaj estas nur ekĝermintaj projektoj.

Gravas do, ke en tiu ĉi multlingva projekto Esperanto aperu inter la plej gravaj lingvoj de la mondo, kvankam Esperantoparolantoj estas malpli multnombraj ol parolantoj de aliaj lingvoj, inter kiuj ĝi staras. Tion oni povas danki al konstantaj penoj de volontula multnacia redaktantaro: miloj da kontribuintoj, inter kiuj kelkdek tre aktivaj, laboris por ekkonstrui tiun ĉi vastan projekton, kies celo estas krei kiel eble plej kompletan fonton de sciaĵoj pri ĉiuj temoj.

En la Vikipedio ĉiu unuopa artikolo estas ligita al ĉiuj samtemaj artikoloj en ĉiuj aliaj lingvoj: sekve ĉiufoje kiam iu artikolo ekzistas en Esperanto, legantoj de la samtema artikolo en la aliaj lingvoj povas vidi ke ĝi ekzistas kaj povas eklegi ĝin tre facile per simpla alklako sur la vorto "Esperanto" kiu aperas en la flanka strio de la paĝo.

Ju pli valora estos la Esperantlingva vikipedio, des pli indos por la estontaj generacioj lerni la lingvon, ĉar ili scios ke ili povas trovi helpon en siaj studoj ĉi tie. La fenomeno jam funkcias por la plej disvolviĝintaj vikipedioj: lernantoj, studentoj,



instruistoj kaj ĉiu ajn pli kaj pli aliras la Vikipedion por tie trovi fidindajn respondojn al siaj demandoj. La TTT-ejo de la Vikipedio kaj de ties idaj projektoj (Vikivortaro, Vikicitaro, Vikispecioj, Vikinovajoj, Vikilibroj, ...) nun staras inter la plej vizitataj ttt-ejoj en la mondo.

La vikipedian miraklon ni devas danki al la vikitekniko, kiu ebligas al ĉiu ajn retvizitanto tuj fariĝi kunredaktanto per simpla alklako de la ligilo "redaktu", kiu aperas sur ĉiu paĝo. Jen tial tiu ĉi projekto tiom rapide kreskis kaj plu kreskas: dekoj da miloj da homoj kunlaboras aldonante, korektante, plibonigante, kunligante la pli kaj pli vastan artikolaron. La timo ke libera ttt-ejo, kiun ĉiu ajn povas redakti, fariĝus ĥaoso, montriĝas senbaza: en la realo ĉiu intenca aŭ malintenca difekto de la komuna verko estas rapide korektita de atentemaj aliaj partoprenantoj.

Estas menciinde ke la artikolo pri Esperanto ekzistas en 71 lingvoj de Vikipedio, el kiuj sep estis elektitaj kiel elstaraj artikoloj, do, ili estas aparte bonkvalitaj kaj informplenaj artikoloj. (Kompare, Multlingva Informcentro pri Esperanto ekzistas en 62 lingvoj).

Konklude pro ĉiuj tiuj kialoj la Vikipedio povas signifoplene helpigi al la progresoj de la ideo kiun homoj ekhavas pri Esperanto. Vikipedio helpas Esperanton: esperantistoj kunhelpu por ke la Esperantlingva vikipedio ankoraŭ pliboniĝu kaj pliriĉiĝu. <http://eo.wikipedia.org>

* Dum redaktado de tiu ĉi artikolo fine de de julio, la nombro jam superis 55 mil. Pasintjare E-Vikipedio havis 25 mil artikolojn, kaj dum nur la pasinta jaro la nombro de artikoloj duobliĝis – red.

Esperantumado en georgiaj... Alpoj



Ĵenja AMIS

Imagu vin en ie ĉe la piedoj de Alpoj. Vin ĉirkaŭas belegaj bavar-stilaj blankaj domoj kun ruĝaj tegolaj tegmentoj kaj ventoflagoj, kun ĉizelitaj ŝutroj, skribaĵoj en la germana lingvo. Kaj nun imagu ĉion ĉi... en sud-orienta Usono! Ĝuste tie, en la montara norda Georgio, en la ŝtatparko Unicoi, apud alpeca vilaĝo Helen, la 31-an de marto – 2-an de aprilo, okazis la unua Sud-Orienta Regiona Esperanto-Kongreseto.

Je la grandega ĝojo de la organizantoj venis sufiĉe multaj partoprenantoj: ja sukcesecon de aranĝo oni povas kalkuli per kvanto de la venintaj homoj. Al nia kongreseto venis 26 homoj el ses usonaj ŝtatoj, ok devenlandoj kaj kun dek unu denaskaj lingvoj. Plejparto de la kongresanoj, kompreneble, venis el Georgio (15), sed multaj homoj venis el foraj lokoj: kvar homoj (plus du hundoj!) venis el Florido, du – el Tenesio, tri el Virginio, unu el Kentukio kaj unu (ELNA-prezidanto Filipino DORCAS) eĉ flugis el Teksaso! Por nia regiono veno de 26 homoj estas tre bona: ja esperantistoj en la sud-orienta regiono plejofte loĝas tre dise (kun

kelkaj esceptoj, kiel Atlanto), kaj en kelkaj ŝtatoj ankoraŭ, laŭ mia scio, ne estas lokaj grupoj. Ni komencis aktive reklami la kongreson kelkajn monatojn antaŭ la kongreso mem: aldone al anoncoj en *Esperanto USA* kaj en la ELNA-retpaĝo, ni dissendis (rete kaj poŝte) informojn al ĉiuj informpetintoj de ELNA en nia regiono.

La ĉefa emfazo de la kongreso estis instruado: ni havis du nivelojn de kursoj – por komencantoj kaj progresantoj/progresintoj. La komencantan kurson (10 lernantoj) gvidis Randy DEAN kaj Jim HENRY – ili uzis la unuajn epizodojn de *Pasporto al la Tuta Mondo*, instruis pri la skribo kaj elparolo de la lingvo, pri finaĵoj (kun emfazo pri la verboj) kaj pri la plej oftaj afiksoj (inkluzive *-ig* kaj *-iĝ*). Krome, ili faris ankaŭ multajn paroligajn ekzercojn. La “esperantisteco” de la komencantoj variis de ses semajnoj da studado ĝis unu jaro, kvankam unu homo neniam antaŭe studis Esperanton. La aĝoj variis ekde 20+ ĝis 70+.

La postkomencantan (ĝis supernivela) kurson instruis Joel kaj Ĵenja AMIS: ĝin partoprenis 12 homoj, kaj la nivelo variis de postkomencanta ĝis fluparolanta. Ni uzis diversajn materialojn: skribajn gramatikajn ekzercojn de www.edukado.net, paroligajn taskojn (ekz., intervjuojn kaj prezentojn de aliaj kursoj al la grupo), diskutojn (ekz., pri motivoj lerni Esperanton) kaj ankaŭ faris metiejon pri falsaj amikoj inter la angla kaj Esperanto kaj ĝenerale pri malfacilaĵoj de tradukado el la angla en E-on, kiun mi preparis speciale por tiu ĉi kongreseto. Ni ankaŭ parolis pri ĉiuj uzoj de akuzativo, transitiveco/netransitiveco, ĝusta uzo de “po”, malsama akordiĝo de verbotempoj en la angla kaj E-o ktp. La aĝoj de lernantoj en la postkomencanta-supernivela grupo estis de 16 ĝis 80+.

Sed, kompreneble, ne ĉio dum la kongreseto estis nur instruado! Ni havis multajn interese-gajnajn prelegojn kaj amuzajojn. Dum la interkona vespero, ekzemple, ni lernis, ke inter la partoprenantoj troviĝas piloto, ŝip-inĝeniero, ke du homoj loĝas en boato, ke unu homo trifoje renkontis la aktorinon Phylcia RASHAD, ke du hundoj (ĝuste tiuj, kiuj venis el Florido) “komprenas” nur Esperanton, ke iuj partoprenantoj havas iom da indiana sango, ke du homoj laboras por la ŝtato Georgio, ke unu homo havas ĝardenon dediĉitan al Zamenhof. S-ro Stan BUCHHOLZ (li venis kun la edzino el Florido) prezentis marioneton de Zamenhof, kiun li faris antaŭ tiu ĉi kongreso. La pupo furoris kaj estis multfoje fotita.

Alia interesa ero estis “PIV-ludo” (en ukraina varianta, “Trompludo”), tre ŝatata de esperantistoj en eks-Sovetio. Ĝi iom similas al la anglalingva ludo *Balderdash*: oni elektas malfacilajn, aŭ malmulte konatajn, vortojn el PIV, kaj la teamoj devas elpensi “sian” difinon por tiu ĉi vorto, kiu devas soni kredebla. La gvidanto voĉlegas la elpensitajn difinojn, inter kiuj troviĝas ankaŭ la ĝusta, kaj la grupoj voĉdonas por tiu signifo, kiu sonas kiel ĝusta. Gajnas tiu kiu elpensis la plej kredeblajn difinojn.

Dum la kongreso Frans JAHGER proponis premiojn per la *Nova Plena Ilustrita Vortaro* partoprenanton kun la plej klara kaj komprenebla elparolo: ĝin gajnis Randy DEAN (gratulojn!).

Pro tre limigita tempo, multaj la prelegoj okazis dum la kafopaŭzoj (la prelegoj okazis kaj en Esperanto, kaj en la angla – aparte tiuj kiuj celis komencantojn): temis pri ELNA kaj aliaj E-organizoj kaj la Esperanto-Movado ĝenerale, pri la manieroj disvastigi Esperanton, pri NASK, Esperanta literaturo, Rozkrucismo kaj Spiritismo. Okazis ankaŭ unu intereseĝa (kaj tute spontana) prelego de Helen BUCHHOLZ pri ŝiaj spertoj kiel usona knabino, “kaptita” en nazia Germanio – oni deportis ŝian familion pro kontraŭleĝa enmigrado de ŝia patro el

Germanio. Helen estas aŭtorino de du libroj – *American Hamburger* kaj *Another Dance of Life*, – kiuj estas premiitaj de National League of American Pen Women, kaj ŝi ankaŭ ofte prelegas. Dum la kongreso eĉ eblis aĉeti tiujn librojn – kaj la aŭtorino afable donacis 10% de la vendenspezo al ELNA.

Kompreneble, okazis ankaŭ ekskurso al la nekutima, preskaŭ fabela, alpeca urbeto Helen, promeno al akvofalo kaj simple multe da babilado. La kongreso sukcesis, kaj tio estis plej bona rekompenco por ni organizantoj. Sed la tuta kongreso ne estus ebla sen granda helpo de la Schulze-fonduso, kiu kovris la plej grandajn kostojn: la tutan instruan parton de la kurso, inkluzive luon de la ejo dum la instrua tempo, fotokopiadon kaj ĉiujn aliajn materialojn. Ni kore dankas la fonduson pro tiu ĉi helpo! Kaj ni ankaŭ ege esperas, ke la Sud-Orienta Esperanto-Kongreseto okazos ankaŭ venontjare kaj invitas esperantistojn el nia regiono pripensi la eblon organizi ĝin. Kaj ni helpos!

Esperanto-Societo de Metropola Atlanto:
www.esperanto-atlanta.org.

Aperis originale en *Esperanto USA*



Mi vivis en Esperantujo

Vasil KONSTANTINOV

La pasinta tenso de la titolo ne estas eraro, karaj gesamideanoj. Mi rakontos al vi, **kiel mi estiĝis civitano de Esperantujo antaŭ ĉirkaŭ 45 jaroj** – kiam mi estis civitano en la plej granda lando en la Mondo, granda kiel la Planedo.

Unuafoje mi informiĝis pri Esperanto en gimnazio. Unu el miaj profesoroj estis pli speciala — el tiuj maloftaj kiuj interese rakontas al la lernantoj ne nur lecionojn, sed ankaŭ ĉion kion por ili mem estis interese ekscii. Pri la ellaboro de miniaturaj modeloj (hufofero por pulo!), pri mikroskribo (la tuta letero ŝajnas makulo de malpura fingro sur la papero!), pri stenografio (skribi pli rapide ol paroli!), pri Esperanto (la gramatiko enteniĝas sur poŝtkarto!)... La stenografion mi ellernis la unuan, per meminstruilo. Terurigante la ceterajn profesorojn — ja por ili miaj streketoj estis nekompreneblaj — samtempe mi tro ĝustecitis iliajn vortojn, he...

Esperanto revenis al mi 10 jarojn pli poste, kiam mi jam estis edziĝinta. La motivo estis stulta — unuafoje mi kaj mia edzino tre malfacile evitis reciprokan riproĉadon en tramo. Hejme, rememorante la okazon jam humure, iu el ni diris: “Kiel bone estus se oni povus interparoli nekompreneble por la ĉirkaŭaj”. Kaj mi tuj rememoris la efikon de stenografio kaj la facilecon de Esperanto!

La bulgaroj diras: “Dirite – farite!”. Kun certa dozo da humuro kaj kuriozemo, sufiĉe intensive ni ekagis. Realigi aventuron ne estis malfacile, je nia surprizo. Tiutempe (la komenco de la 1960-aj jaroj) la Esperantomovado en Bulgario estis forta, subtenata de la ŝtato. Fakte, la bulgara parto de Esperantujo ĉiam estis impona kaj tre aktiva. Interalie, ankaŭ nun. La bulgara esperantista movado kaj

la bulgaraj esperantistoj ne suferis domaĝon pro malpermesoj kaj persekutoj en la epoko de socialismo, male – ili estis tolerataj. Kaŭze de serioza tradicio – Bulgara Esperanta Asocio, la Societo de l’ abstinuloj (de alkoholo) kaj sporta societo “Junak” (Љ í à ê [bulgare] – tre forta, sed bonema viro) ĉiam estis sub la influo de la Bulgara Komunista Partio, speciale kiam ĝi estis persekutata kaj malpermesita en reĝa Bulgario. Inter esperantistoj estis multaj famaj (eĉ monde) intelektuloj. Ekzemple, dum mia studentado mia profesoro estis la mondkonata bulgara muzikologo akademiano profesoro Stojan DĴUDĴEV – sperta esperantisto, eĉ ĉefa redaktoro de la revuo *Scienca mondo*.

Tiutempe en Bulgario oni eldonis librojn, lernolibrojn, vortarojn kaj kelke da gazetoj kaj revuoj en Esperanto. Eĉ la plej luksa “reklama” revuo *Bulgario* (eldonata en kelke da lingvoj por disvastigo en eksterlando) havis Esperantan version. Eblis ankaŭ aboni eksterlandajn Esperantajn eldonojn. I.a. ankaŭ nun en Bulgario aperas kelke da Esperantaj periodaĵoj, la plej fama el kiuj “Áúëääðñëë åñíãðáfðèñð” (“Bulgara esperantisto”) estas seninterrompe eldonata ekde 1919!

Sed mi revenu al mia propra rakonto. Tuj ni trovis kie lerni la lingvon – per la helpo de nia konatino, kiu oficis en la estraro de la bulgara poŝto, ni aliĝis al la kurso por oficiistoj de la Ministerio de Poŝto kaj Komunikado.

La partoprenantoj estis sufiĉe diversaj rilate al aĝo kaj klereco – inter la kursanoj estis eĉ unu mezaĝa policisto el la gardistaro de la Ministerio, kun nur elementnivela klereco! Simila situacio en kiu ajn fremdlingva kurso provokus nur ironion kaj dubojn, ĉu li estas en la ĝusta loko. Sed jam la unuaj lecionoj montris al ni ke ĉi tio estas io unika. Antaŭ ĉio, niaj atendoj estis superigataj: la gramatiko vere

enteniĝas sur poŝtkarto, ellerni ĝin ne estas problemo (eĉ por tiu policisto!) kaj ellernante ĝin vi jam “fariĝas esperantisto” sendepende de tio ke vi ankoraŭ scias tro malmulte da vortoj – sufiĉas ke oni havu bonajn vortarojn. Tiaj estis aĉetebraj – “Bulgara-esperanta vortaro” kaj “Esperanto-bulgara vortaro” enhavantaj pli ol 30 mil titolvortojn (ili ankaŭ nun helpas al mi). Oni povis aĉeti eĉ poŝajn vortaretojn 9 x 6 cm – tre simpataj kaj taŭgaj.

Finfine la rezulto de la kurso estis ke neniu forlasis ĝin, ĉiuj “ekparolis” kaj... kreiĝis novaj amikecoj. Ja se vi akiris ion tiel interesan kaj unikan, aperas deziro uzi ĝin. Ni longe renkontiĝadis por babiladi. Kutime en kafejo – tre agrable estis vidi la mirigitajn rigardojn ĉirkaue...

Ĉio ĉi por mi tamen baldaŭ rezultigis ion multe pli gravan kaj interesan – mi malkaŝis la “interreton” de la tiama epoko!

La Esperantaj gazetoj de tiu tempo kutime havis 1-2 paĝojn da adresoj por korespondado. Tentiĝis de la “ekzotikeco” (por ni en Bulgario), mi kuraĝis skribi (vivu la vortaro!) al geesperantistoj el Cejlono, Kamerunio, Urugvajo... Kaj “dronis”! Post unu jaro mi jam interkorespondadis kun pli ol 100 Esperantaj geamikoj en preskaŭ ĉiuj anguloj de la mondo. Kun iuj el ili mi havis okazon konatiĝi reale... Kaj eĉ mia korespondanto el Italio edziĝis al nia amikino, kiu devis tre rapide ellerni Esperanton – ja ĝi estis ilia “geedza lingvo” komence.

Dum deko da jaroj de intensa korespondado estis diversaj amuzaj okazoj. Jen unu el ili:

Inter la unuaj miaj korespondantoj estis gimnaziano el Cejlono, al kiu mi abonigis kelkajn Esperantlingvajn eldonaĵojn (tiam en Bulgario estis eble fari tiel). Dezirante kvitiĝi, li ruze demandis min interalie ĉu ni trinkas teon kaj ĉu estas konata al ni cejlona teo. Kelkajn monatojn post mia jesa respondo mi surprize

ricevis grandan poŝtpakaĵon el Cejlono – grandan kartonskatolon plenan je dekduo da diligente surskribitaj paperaj sakoj kun cejlona teo. Kaj leteron: mi sendas al Vi specimenojn, skribu al mi, kiuj plej plaĉas al Vi, por ke mi sendu ilin plu! Kompreneble, mi dankeme respondis ke liaj “specimenoj” sufiĉos por mi kaj miaj amikoj dum kelkaj jaroj, ja ni plezure trinkos bonegan cejlonan teon, sed kiel ordinaraĵoj ne banos sin en ĝi.

He, rilate poŝtsendaĵojn – foje malaperis iuj el ili, tamen ne ofte. Ekzemple, sciante pri mia inklino al la malvarmaj bataliloj, mia korespondanto el Kubo sendis al mi “maĉeto”, kiu neniam atingis min. Tamen la tri miniaturnaj modeloj de spadoj el Toledo (Hispanio) nun ankoraŭ estas antaŭ mi sur mia tablo.

Tiel ni vivis iam en Esperantujo. Gaje, amuze kaj...nefacile. La junuloj el vi malfacile imagos al si, kion signifas manskribi ĉiutage poŝtleteron (ofte ne nur unu!), kaj poste ankoraŭ iri en poŝtejon por sendi ĝin!

Hodiaŭ, de la distanco de la pasinta tempo, mi bone komprenas ke la vivo en Esperantujo donis al mi ne nur emociojn, sed ion multe pli gravan. Ĝi igis min pli bona, pli kunsentema, pli kompatema, pli preta kompreni la aliajn – unuvorte, vera normala ero de la homaro.

Dankegon, Esperanto!

Vasil KONSTANTINOV, Sofio (Bulgario) estas aktiva uzanto de la reta forumo <http://e-novosti.info/forumo>

**Blogoj kaj Forumoj
nun funkcias ĉe la TEJO-retpaĝaro!
www.tejo.org**

Grafikokonkurso de TEJO: june kaj kune

Cu vi ŝatus famiĝi, helpi TEJO-n kaj ricevi iom da mono cetere? Nu, jen via ŝanco! Post kiam ni lanĉis la novan retpaĝaron ĉe www.tejo.org, ni decidis havi grafikokonkurson por ke niaj membroj povu elmontri siajn belajn fotojn kaj talenton pri grafikajoj. Jen la kategorioj:

Fotoj

Ni serĉas fotojn kiuj montras la diversecon de TEJO sub nia slogano "june kaj kune". Se vi imagas la foton en konkreta loko, vi povas aldoni en kiu paĝo vi ŝatus ke ĝi aperu.

Premio: 20 EUR aŭ 1-jara TEJO-membreco (MJ-T)

Emblemo

Ni ŝatus havi novan emblemon – ĉu vi povas elpensi kaj krei pli bonan ol la nuna emblemo de TEJO kiu troviĝas ĉi-apude?

Premio: 20 EUR aŭ 1-jara TEJO-membreco (MJ-T)



Grafikaĵo

Ni ŝatus havi ankaŭ bonajn desegnaĵojn. Ni cetere serĉas amikojn por Pepo.

Premio: 20 EUR aŭ 1-jara TEJO-membreco (MJ-T)

Haŭto por Drupalo

Ĉu la aspekto de la nuna tejo.org estas tro simpla laŭ vi? Ni uzis defaŭltan haŭton de la programo Drupalo. Legu la instrukciojn ĉe <http://drupal.org/node/509> (bedaŭrinde nur angle) por ekscii kiel fari.

Premio: 40 EUR aŭ 2-jara TEJO-membreco (MJ-T)

Kondiĉoj

Sendu viajn kontribuojn al tejokonkurso@gmail.com kun la temlinio: "Grafikokonkurso". Ne sendu dosierojn kiuj estas pli grandaj ol 1 MB (prefere ne pli ol 100K). Ankaŭ skribu en kiu paĝo aŭ eldonaĵo plej indus uzi ĝin. Se ni ne uzos iun ajn kontribuojn de iu kategorio, tiam ni ne donos premion por tiu kategorio. Ekzemple, se oni nur sendas al ni aĉajn haŭtojn por Drupalo, tiam ni ne premios en tiu kategorio.

Atentu: Ĉiuj dosieroj kaj tekstoj senditaj iĝos plena apartenaĵo de TEJO! La limdato estas la 30-a de novembro 2006. Dankon pro viaj kontribuoj!

La Estraro de TEJO 2005-2007

Prezidanto: Heming WELDE
THORBJØRNSEN
Trondheimsveien 197A/44
N-0570 Oslo
NORVEGIO
prezidanto.tejo@silisium.net

Kasisto: Adélaïde CHARRIÈRE

Ĝenerala Sekretario: Valentina SIDOROVA
3, rue des Nereides
FR-78180 Montigny-le-Bretonneux
FRANCIO
grimpi@bk.ru

Landa Agado kaj Afrika Agado:

François HOUNSOUNOU
B.P. 226
BJ – Lokossa, Mono
BENINO
frank@tejo.org

Informado: Chuck SMITH
chuckssmith@gmail.com

Eksteraj Rilatoj: Haris SUBAŠIĆ,
Zagrebačka 40
BA-88000 Mostar
BOSNIO KAJ HERCEGOVINO
hara@ikso.net

Kongresoj kaj Aktivula Trejnado: David-Emil

WICKSTRÖM
c/o Nastja KOJEVNIKOVA
84-1-206 pr. Lunaĉarskogo
RU-195274 Sankt-Peterburg
RUSIO
dew@tejo.org

Centra Oficejo: TEJO
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
NEDERLANDO
Tel: +31-10-436-1044
Faks: +31-10-436-1751
oficejo@tejo.org
www.tejo.org
TEJO-volontulo: Martin MINICH

Slava popolroko? Jes!

JoMo slavumas. JoMo kaj aliaj. KD kun 24 titoloj (70 min.). Donneville: Vinilkosmo, 2006.

Jenja Amis, Ukrainio/Usono

Por la “malnovaj” esperantistoj oni certe ne devas prezenti JoMo-n. Tamen, jen, en nur kelkaj vortoj: francdevena kantisto, profesia muzikisto, komponisto, tradukisto, mondciivtano, liberecano, poligloto (pro la kantado en pli ol 22 lingvoj li eĉ eniris Guinness-libron en 2000, kvankam nun li kantas en pli ol 30!)... kaj simple afablega, modesta kaj tre amikema persono. La vorto “JoMo” (aŭ “jOmO”) estas mal-longigo de la unuaj literoj de lia nomo: Jean Marc LECLERCQ.

JoMo estas eks-estro de la bando *Rosemary’s Babies* (t.e. Rozmariaj Beboj), kiu “lanĉis du KD-ojn ĉe la franca eldonejo Boucherie et Willins Production, kaj kies “scena urĝeco” estis maksimume montrita en varmaj koncertoj tra la tuta Eŭropo, krom pli ol 200 nur en Francio” (el la ret-paĝo <http://www.musicexpress.com.br>). Liaj koncertoj furoras en Esperantujo (li povas dancigi ĉiujn!), kaj la diskoj *JoMo kaj Liberecanoj* kaj *JoMo friponas ĝuis* grandan sukceson en Esperantujo, kaj jen antaŭnelonge oni eldonis la trian diskon de JoMo (kaj Liberecanoj): *JoMo slavumas*.

JoMo bonege konas slavan muzikon pro siaj multegaj vojaĝoj al Orienta Eŭropo: nur Ukrainion li vizitis kelkfoje en la lastaj jaroj kaj planas plian viziton ĉi-junie! Li libere parolas multajn slavajn lingvojn, eldonis gvidlibron pri Ukrainio en la gaskona lingvo kaj verkas libron pri fama ukraina anarkiisto – Nestor MAĤNO.

Same kiel diras la titolo, la kantoj en la disko estas inspiritaj de slava (aŭ orienteŭropa) muziko. La rezulto de tiu miksaĵo estas unika, preskaŭ duhora (!) roka koktelo el rusa, ukraina, jida, pola kaj cigana popolmuziko. Jes, vi ne mislegis: ĝuste roka. En iu senco tiu ĉi albumo rompas la stereotipojn pri slava popolmuziko – sed ĉu tio ne estas la celo de Esperanto: rompi stereotipojn?




Multaj kantoj en la albumo, tamen, estas slavecaj kantoj, komponitaj de JoMo mem. Krome, JoMo ankaŭ tradukis la plejparton de la kantoj en Esperanton, vere mirinda laboro! Aldone al JoMo kaj Liberecanoj, en la kreado de la disko partoprenis rusa ensemblo de tradicia muziko “Solniško”.

La kantoj estas tre variaj, plejparte dancigaj kaj gajaj (sed ankaŭ pensigaj!), sed foje troviĝas ankaŭ iom malgajetaj melodioj. Estas en la disko ankaŭ tute ŝerca kanto “Pola”, inspirita de la fama kanto “Sola”, aparte ŝatata de la E-junularo: pri amindumo dum la pasintjara “pola” IJK. Impresis min ankaŭ la belega, bunta kovrilo, kaj la utila akompana tekstolibreto.

Kvankam skrupula lingvisto certe trovos en la tekstoj malglatatojn kaj iujn “ne-PIV-ajn” vortojn (“ŝunkli”, “stas”) – tion oni certe povas pardoni al vera liberecano! Unuvorte – mi ĝuis la diskon ekde la unua minuto ĝis la lasta kaj elkore rekomendas la diskon al ĉiuj, kiuj ŝatas la antaŭajn diskojn de JoMo, scivolas pli slava muziko aŭ simple volas ĝui bonan rokon!

La disko aĉeteblas de la Libroservo de UEA <<http://katalogo.uea.org>>, la eldonisto – <<http://www.vinilkosmo.com>> kaj de ĉiuj grandaj libroservoj.

Nova Redaktoro por *TEJO Tutmonde* Serĉata!



Ĉu vi bone regas Esperanton, bone konas la Movadon, ŝatas verki kaj redakti, sed ĝis nun ne havis okazon apliki viajn talentojn por la bono de Esperanto? Jen perfekta ŝanco por vi! La nuna redaktoro redaktos TT-on ĝis (plej laste) la fino de 2006. Do, ni serĉas novan redaktoron kiu povos eklabori komence de 2007 aŭ, prefere, pli frue (eĉ jam nun!).

Kandidato por la TT-redaktoreco havu:

- Bonegan lingvoscipovon
- Profundan konon de la junulara E-movado specife kaj la Movado ĝenerale
- Kapablon redakti kaj revertumi eĉ la plej malfacilajn (foje burokratecajn) artikolojn/raportojn
- Kapablon instigi /varbi kontribuantojn
- Kapablon kunlabori kun la redaktoro de *Kontakto* por sinkronigi la prespretiĝon de *TT* kun tiu de *Kontakto*
- Kapablon mem grafiki/prespretigi, aŭ havu helpanton kiu povas tion fari.

La redaktoro de *TEJO Tutmonde* ricevas honorarion (nun 400 EUR jare – sed eventuale negocebla kun la TEJO-estraro). La nova redaktoro eklaboru kiel eble plej baldaŭ (sed almenaŭ antaŭ la komenco de 2007).

Por informoj pri la redakta laboro mem, kontaktu Joel AMIS, tejo-tutmonde@tejo.org

Por kandidatiĝi sendu viajn viv-resumon kaj kandidatiĝan leteron al la Ĝenerala Sekretario de TEJO – Valentina Sidorova, grimpi@bk.ru



Korajn gratulojn al Slavik Ivanov kaj Natalja Guseva, al kiuj naskiĝis filineto Maŝa!